**Vintro 2001**
**(1)**
**Jan. - feb. - mar.**

La *Vocho de Amikejo*
iama gazeto de Neuxtrala Moresneto, oficiala informilo de

# Senlime

Esperanto-Asocio en Euxregiono Mozo-Rejno

En cas de non distribution, renvoyer à:
S-ro Heinrich **Lentzen**,
Feldweg 20
B 4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-554326
Mail: lentzenh@gmx.net

## Enhavo :

2. La printempa gxardeno de l'Euxropo
3. Le jardin printanier de l'Europe
4. Nia agendo
5. Ni anoncas
6. Verviersa angulo

**E**ldonita de **V**erviersa **E**speranto-**G**rupo kaj ***S**enlime*, kunlabore kun la **M**inisterio pri franclingva **K**omunumo en **B**elgio.

Tiu-cxi informilo senpage konsulteblas kaj kopieblas el niaj ret-pagxoj je la URL: http://www.ping.be/jmjsenlime
H. Lentzen prizorgas surpaperigon kaj sendadon nur al la kotizintaj membroj. La belgaj valonoj, membroj de APE, ricevas la informilon ene de "Inter Ni".

**Editeur responsable / Responsa eldonanto (franclingva):**
Tel. xx-32-(0)87-330292
Mail: JMJacques@galaxycorp.com
J.-M. Jacques, Pl. Verte 23 bte 3,
B-4800 VERVIERS
**Informatie in het Nederlands / Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-43-3062015
Mail: sinno@ibac.rwth-aachen.de
T. Sinno, In 't Oord 45
NL-6291 VN VAALS
**Informationen auf deutsch / Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@t-online.de
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
D-52134 HERZOGENRATH

**Jara abono / aligxo : 10 EUR**
**Belgio** : konto 000-0245571-64
Esperanto-Grupo, rue Donckier 22,
B-4800 VERVIERS
**Nederlando** : konto 57 89 43
Senlime, Rothenbachpark 44
6063 NM Vlodrop
**Germanio** : konto 6623201,
Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000)
Im Pesch 20
D-52134 HERZOGENRATH

# *Senlime* invitas vin al TRILANDA RENKONTIGxO EN KEUKENHOF (HAARLEM)

dimancxon, la 29-an de aprilo 2001




## La printempa gxardeno de l'Euxropo

Printempe, Keukenhof nature estas la flora allogejo de Nederlando. En la 32 ha parko florumas dum ok semajnoj milionoj da bulboj el cxiuj cxielarkaj koloroj. En la tuta parko kaj unuafoje cxijare en nova disvolva regiono kaj en 'Gxardendomo Orange Nassau', vi povos admiri milojn da tulipoj (interalie la 'Esperanto-tulipo') kaj aliaj florumantaj bulboj...

Renkontigxu kun Senlime-anoj en Keukenhof (Haarlem),

# printempa gxardeno de l'Euxropo

La bulboj de Keukenhof estas liveritaj de cento da entreprenoj, nomitaj 'Provizistoj de la Kortumo'. Inter la fino de septembro kaj la unuaj frostoj, la bulboj estas plantitaj de trideko da gxardenistoj.

Por certigxi ke, de marto gxis majo, estos suficxe da koloroj por vidi en la tuta parko, Keukenhof jam de dek jaroj uzas la pluretagxan plantadon. Tio signifas ke la bulboj estas plantitaj unuj super la aliaj. Unue, plej profunde en la grundo, estas la malfrukreskontaj tulipoj, supre la fruaj kaj poste la krokusaj. Tiel estas trifoje koloroj en la sama ejo de la parko, same frue kiel malfrue en la sezono.

Krom milionoj da plantitaj bulboj, pli ol 6.500 kilogramoj da herbgrajnoj estas semitaj cxiujare por alporti, krom la belbrilegecon de la floraj koloroj, vivverdan gazonon.

**Arto en Keukenhof**

Arto cxefrolas en Keukenhof. Tiel naskigxas harmonio inter naturo kaj kulturo. En la parko, dauxra ekspozicio de statuoj estas admirebla kun artajxoj kiel 'Het Ruiterbeeld' (La Statuo de l'Kavaliro) de P. Koning, 'Dynamisch Evenwicht' (Dinamika Ekvilibro) de C. van Kervel, appelé aussi 'Witte Bollen' (Blankaj Bulboj), 'De Kangaroe' (La Kanguruo) de Vermeer, 'Het Dolfijntje' (Le Delfineto) de B. De Clerq-Brinkgreve, 'Zesdelige Vorm' (Sesparta Formo) de G. Bruning et 'Gehurkte Vrouw' (Kauxra Virino) de N. Jonk. En la parko, ankaux estas statua vojo. Krom tiu statua vojo, estas ekspozicioj pri fotografajxoj kaj pentrajxoj en diversaj gxardendomoj.

**La temaj gxardenoj**

La florprezentoj en Keukenhof ne trovigxas tie nur por esti admiritaj. Ili ankaux estas inspirfonto por estigi la emon labori per bulboj. Cxiu el la temoj koloro, odoro, renaskigxo, abstrakta stilo, akvo kaj floraj borderoj estas ellaborita en specifa gxardeno, je malgranda simpla skalo hejme adaptebla. Vi povas pridemandi la informbudon pri viaj demandoj ne nur koncerne la plantadon de la printempaj kaj someraj bulboj kaj de la stauxdoj, sed ankaux pri la arangxado kaj la prizorgado de la gxardeno.

En la 'Natura gxardeno', la bulbaj plantoj kaj la tuberaj plantoj estas asociigitaj al la stauxdoj en natura medio. Tiuj bulboj kaj stauxdoj reiras al sovagxa stato, kio naskas naturan ekvilibron. Tio okazas en la 'Muzika gxardeno', en la interspaco inter la malnova muelilo kaj la 'Gxardendomo de la Regxino Beatriks', kiu situas iom flanke de la tre frekventitaj vojiroj. En tiu gxardeno kun interalie bulbaj plantoj, estas muziko lauxlonge de la pado de l'arbara skolopo kaj de la malgranda lageto.

Cxijara novajxo en Keukenhof estas la Historia Gxardeno. Pasante tra lignaj pordoj, la vizitantoj reeniras tra la historio en la Mezepoko. En tiu 'sekreta' gxardeno cxirkauxita de muroj, diversaj bulbaj plantoj kaj delikataj herboj estas prizorgataj de personoj portantaj historiajn vestajxojn kaj uzantaj tradiciajn ilojn. Foje-foje, sxajnas ke Jacoba van Beieren mem kaj sxia sekvantaro povus aperi en la gxardeno…

**Vojo de la Cxampionoj**

Por la junaj vizitantoj ankaux, estas multe por fari, kiel la vojo de la 'Cxampionoj', vojo tra la parko specife strekita por la infanoj. Tiu vojo ebligas al ili vidi la tutan parkon kaj fine ili cxion scias pri la mondo de Keukenhof kaj de la bulboj. Fine de sia vizito, redonante plenigitan demandaron, la 'Cxampionoj' ricevas etan memorigajxon pri Keukenhof.

**Internaj ekspozicioj**

Printempe, abundas floroj ne nur ekstere en Keukenhof. En la diversaj gxardendomoj estas diversaj floraj ekspozicioj por admiri, les Floraj Paradoj. La konstanta spektaklo de orkideoj estas translokigita en la 'Gxardendomo de la Regxino Beatriks' kie vi povas vidi pli da specioj da bambuoj en subtropika atmosfero.

**Bulbaj vendejoj**

Dum la printempa Gxardeno, estas ses bulbaj vendejoj en la parko kie vi povas meni pakajxon da bulboj kiujn vi mem estos elektintaj. La bulboj estos auxtomate senditaj al vi en oktobro. Krome, du floristoj proponas grandan elekteblecon da trancxitaj floroj. Kaj vi trovos en la parko nenombreblajn magazenojn vendantajn vastan sortimenton da memorigajxoj pri Keukenhof kaj Nederlando. Tie ankaux estas vendataj diversaj fotografiaj akcesorajxoj.

Rencontrez les membres des trois pays de*Senlime* à keukenhof (Harlem),

# jardin printanier de l'Europe

Keukenhof

Les bulbes de Keukenhof sont livrés par une centaine d'entreprises, appelées 'Fournisseurs de la Cour'. Entre la fin septembre et les premières gelées, les bulbes sont plantés par une trentaine de jardiniers. Pour s'assurer que de mars à mai, il y aura suffisamment de couleurs à voir dans tout le parc, Keukenhof utilise depuis dix ans déjà la plantation en étages. Cela signifie que les bulbes sont plantés les uns au-dessus des autres. Premièrement, le plus profondément dans le sol, les tulipes tardives, au-dessus les précoces et ensuite les crocus. Il y a ainsi trois fois de la couleur au même endroit du parc, aussi bien tôt que tard dans la saison. En plus de millions de bulbes qui sont plantés, plus de 6.500 kilos de graines d'herbe sont semés chaque année pour apporter en plus de la splendeur des couleurs des fleurs un gazon vert vif.

**Oeuvres d'art à Keukenhof**

L'art joue un rôle primordial à Keukenhof. Ainsi naît une harmonie entre nature et culture. Dans le parc, une exposition permanente de statues peut être admirée avec des œuvres d'art comme 'Het Ruiterbeeld' (La Statue du Chevalier) de P. Koning, 'Dynamisch Evenwicht' (Équilibre Dynamique) de C. van Kervel, appelé aussi 'Witte Bollen' (Bulbes blanches), 'De Kangaroe' (Le Kangourou) de Vermeer, 'Het Dolfijntje' (Le Petit Dauphin) de B. De Clerq-Brinkgreve, 'Zesdelige Vorm' (Forme sexpartite) de G. Bruning et 'Gehurkte Vrouw' (Femme Accroupie) de N. Jonk. En plus de l'itinéraire des statues, il y a des expositions de photos et de peintures dans différents pavillons.

**Les jardins à thèmes**

Les présentations de fleurs à Keukenhof ne sont pas là seulement pour être admirées. Elles sont également une source d'inspiration pour susciter l'envie de travailler avec des bulbes. Dans différents jardins, les thèmes couleur, odeur, renaissance, style abstrait, eau et bordures de fleurs sont chacun élaborés dans un jardin spécifique, à une petite échelle simple adaptable chez soi. Vous pouvez vous adresser au stand d'information avec vos questions concernant la plantation de bulbes du printemps et de l'été et des plantes vivaces, mais également sur l'aménagement et l'entretien du jardin. Dans le 'Jardin naturel', les plantes à bulbes et les plantes à tubercules sont associées aux plantes vivaces dans un environnement naturel. Ces bulbes et plantes vivaces retournent à l'état sauvage d'où naît un équilibre naturel. Cela arrive également dans le 'Jardin de la Musique', dans l'espace entre le vieux moulin et le 'Pavillon de la Reine Beatrix', qui se trouve quelque peu à l'écart des parcours très fréquentés. Dans ce jardin avec entre autres des plantes à bulbes, il y a de la musique le long du sentier de la bécasse des bois et du petit étang. Nouveau cette année à Keukenhof, c'est le Jardin Historique. En passant par des portes en bois, les visiteurs remontent dans l'histoire à l'époque du Moyen-Age. Dans ce jardin 'secret' entouré de murs, différentes sortes de plantes à bulbes et de fines herbes particulières et anciennes reçoivent tous les soins de personnes portant des vêtements historiques et utilisant des outils traditionnels.

**Route des Champions**

Pour les jeunes visiteurs également, il y a beaucoup de choses à faire, comme la route des 'Champions', un circuit à travers le parc qui est tracé spécialement pour les enfants. Cette route leur permet de voir l'ensemble du parc et ils finissent par tout savoir du monde de Keukenhof et des bulbes. A la fin de leur visite, les 'Champions' reçoivent un petit souvenir de Keukenhof en rendant le questionnaire.

**Expositions intérieures**

Au printemps, il n'y a pas seulement une surabondance de fleurs à l'extérieur de Keukenhof. Dans les divers pavillons, il y a différentes expositions florales à admirer, les Parades de Fleurs. Le show permanent des orchidées est déplacé dans le 'Pavillon de la Reine de Beatrix' où vous pouvez voir davantage de sortes de bambou dans une atmosphère subtropicale.

**Points de vente des bulbes**

Au Jardin du printemps, il y a six points de vente de bulbes dans le parc où vous pouvez commander un paquet de bulbes que vous aurez choisi vous-même. Les bulbes vous seront envoyés automatiquement en octobre. De plus, deux fleuristes proposent un grand choix de fleurs coupées. Et vous trouverez dans le parc d'innombrables magasins vendant un assortiment étendu de souvenirs de Keukenhof et de la Hollande. Ici, sont également en vente différents accessoires de photographie.

La komunaj kunvenoj de la grupoj de Senlime principe okazas cxiun trian vendredon de monato (krom vintre kaj ferie) en Kelmis (Belgio, kultur-centro "Select", Lütticherstr. 264).

# Euxregiona kalendaro 2000/2001 (3)

***E Senlime p e r a n t o***

Celante plifortigi la interpopolan interkomprenigxon, helpe de la internacia lingvo esperanto, precipe en la Euxregiono Mozo-Rejno, ***Senlime*** publikigas, por siaj kotizintaj membroj, agendon pri la esperanto-arangxoj en la Euxregiono.

Gxi eventuale povas enhavi la programerojn de la lokaj grupoj aux aktivajxojn organizitajn aux subtenitajn de komitatanoj. Gxi neniel igxu kompleta kalendaro de esperanto-arangxoj (aliaj ekzistas).

16/17-an de februaro 2001 - Namur (B) : APE kaj la urbo Namur organizas esperanto-tagojn en la kulturdomo (kunflueje de Mozo kaj Sambro). Partopreno de S-anoj Piron, Robineau, Pairoux, Schrymecker (pri Neuxtrala Moresneto),...
Inf. Marcel DELFORGE
Tel. xx 32 (0)71 / 43.14.13
E-mail: mardelforge@busmail.net



Vendredon, la 16-an de marto 2001 - Kelmis (B) : prelego de Raymond DEMARCHE ("Mi deziregis vidi Butanon kaj mi vidis Butanon" - 1/2).
Inf. Jean-Marie JACQUES:
Tel. xx 32 (0)87 / 33.02.92
E-mail: jmjacques@galaxycorp.com



Dimancxon, la 22-an de aprilo 2001 - Botrange (B) : migrado en Altaj Marcxoj (3 h 1/2) gvidota de Heinrich LENTZEN. (vidu ankaux p. 6)
Inf. Heinrich LENTZEN
Tel. xx 32 (0)87 / 55.43.26
E-mail: lentzenh@gmx.net



Dimancxon, la 29-an de aprilo 2001 - Trilanda Renkontigxo en Keukenhof - Haarlem (NL).
Inf. Trude SINNO
Tel. xx 31 4330/62015
E-mail: sinno@ibac.rwth-aachen.de

Vendredon, la 18-an de majo 2001 - Kelmis (B) : prelego de Klaus HOGEN pri "Kriptologio".
Inf.: Klaus J. HOGEN
Tel. xx 49 (0)2403 / 921949
E-mail: hogen@t-online.de

Vendredon, la 15-an de junio 2001 - 20h00 - Kelmis (B): prelego de Anelies SOUREN pri "La arkitekto Hundertwasser".
Inf. Trude SINNO
Tel. xx 31 4330/62015
E-mail: sinno@ibac.rwth-aachen.de

Dimancxon, la 30-an de junio 2001 - 9h30 - Maillen (B) : tradicia tago de APE (en kastelo Ronchinne).
Inf. Marcel DELFORGE
Tel. xx 32 (0)71 / 43.14.13
E-mail: mardelforge@busmail.net

**!**

**Pro eblaj program-sxangxoj, prefere telefonu cxe la menciita persono antaux ol partopreni aktivajxon.**


# *Renkonte al Esperanto*,

## Kultur-domo Namur (B)

## 16 - 25-an de februaro 2001

**Poezio, muziko, debato prelegoj, ekspozicioj, lernejaj arangxoj, tutmonda kuirarto**

Organizado fare de la urbo Namur kunlabore kun **A**socio **P**or **E**speranto.



**Informoj** :

Service de la Culture
Hôtel de Ville

5000 NAMUR (Belgique)

Tel. xx 32 (0)81 / 24.64.36

aux :

Marcel DELFORGE
Tel. xx 32 (0)71 / 43.14.13

**PROGRAMEROJ**

16-an de februaro je la 20-a horo : Prelego de Bruno ROBINEAU pri vojagxoj cxirkaux la mondo.

17-an de februaro je 16 h.30 : Rebata debato kun partopreno de Profesoro Claude PIRON.

17-an de februaro je la 21-a horo : Koncerto de LIPSTICK en kantaro de Daniel BALAVOINE.

Dum la tuta semajno :

eksopozicio pri la historio, la funkciado kaj la nuntempo de esperanto ankaux temos pri la historio de Neuxtrala Moresneto (Kelmis) kiu iam estis igxonta "patrujo" de esperanto (partopreno de Mathieu SCHRYMECKER).



## DIMANCxOn, 24-an de junio 01

Estu bonvena en kastelo Ronchinne, posxta feri-centro

**PROGRAMO**

- Ekde 10h30 bonvenigo kaj vizito de la bieno
- Cxirkaux 12h komuna tagmangxo en la kastelo Ronchinne-Maillen.
- Vojagxo al urbeto Spontin (+/- 10 km.)
- Vizito de la mondfama kastelo de Spontin (konstruita en 1210)
- Komuna kafo kun kuko en la kastelo de Spontin.

**PREZO** 1.000 BEF - 25,00 EUR (cxion inkluzive).
Antauxpagas al APE-konto 001-0840710-00

**Informoj** : Marcel DELFORGE
Tel. xx 32 (0)71 / 43.14.13

ASSOCIATION POUR L'ESPERANTO
APE
ASOCIO POR ESPERANTO

Sekcio de
**BELGA ESPERANTO FEDERACIO**
Anigxinta al
**UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO**
(en konsultaj rilatoj kun UNESCO)

## *Senlime* kaj **Verviersa Esperanto Grupo**

deziras al vi cxion plej bonan por 2001,
lasta jaro sen Euro,
kaj por la sekvanta jarmilo, kun esperanto !

**V**erviersa **E**speranto**G**rupo

**V**erviersa **E**speranto**G**rupo kaj ***Senlime***
invitas vin kunveni en Select (Kelmis) la 3-an vendredon de cxiu monato
(krom vintre kaj ferie).

# Komitato de V.E.G.:

Prezidanto: J. Jacob
Petit Jonckeu 18
4803 POLLEUR
Tél. 087/22.10.79

Kasisto: R. Demarche
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.68.18

Sekretario: J.-M. Jacques
Place Verte 23 bte 3
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dependas de la franclingva Asocio por Esperanto (A.P.E.)
M. Delforge
Rue des Glacères 16
6001 MARCINELLE

# Cotisations

Les espérantistes et sympathisants de l'Eurégion sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations (inchangées ! ) suivantes au compte
n° 000-0245571-64
de: Esperanto grupo
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS

**D'avance, merci à tous !**

| | |
|---|---|
| APE 2000-2001 | 400 BEF |
| UEA 2001 | 1940 BEF |
| ***Senlime*** 2001 (10 EUR) | 403 BEF |

## La 16-an de marto 2001 : Raymond DEMARCHE prelegos pri : "Mi deziregis vidi Butanon kaj mi vidis Butanon" (1-a parto)



Butano kusxas kie ??? Inter Hindio kaj Tibeto, je la oriento de Nepalo. xi estas malvasta Sxtato himalaja laux tibeta stilo, samampleksa kiel Svisujo, sendependa ek de 1907.

Raymond DEMARCHE ruladis sur la ununura vojo veturebla, kiu trairas la regxolandon de la okcidento al la oriento.

Post la peniga suprenirado gxis la gravega sanktejo Taksang, konstruita kontraux klifo, ni vizitos en Thimbu - la eta cxefurbo - la registaran fortikajxon kolosan kaj la memorigan pregxejon honore al la tria regxo. Poste ne Punakha vi vidos la monahxejo-fortikajxon, dua restadejo de la cxeflamao de l'DRUK YUL (oficiala nomo de l'Butano).

Dum la projekciado Raymond DEMARCHE klarigos unu centon da lumbildoj pri tiu Sxtato iom severa sed ankoraux auxtenta.

## Dimancxon, la 22-an de aprilo 2001, antaux la turo de Botrange je la 13-a h. : foriro al migrado en Altaj Marcxoj gvidota de Heinrich LENTZEN.

Sorcxaj marcxoj, nudaj erikejoj, misteraj arbaroj...

Sekve de antauxa Trilanda Renkontigxo, la 21an de majo 2000, kiu disvolvigxis kore de la Altaj Marcxoj kaj de gxiaj multnombraj belajxoj, kaj laux gxenerala peto, Heinrich LENTZEN denove superfavoros la naturamikojn per pli ol trihora pieda promenado tra tiu mirinda regxiono.



Bonegaj sxuoj aux ecx prefere botoj necesas, precipe se la vetero ne estis bela dum la antauxaj tagoj.

Tiu programo tauxgas nek por infan-veturiletoj nek por rul-segxoj.

Hundoj (kaj aliaj hejmbestoj) estas strikte malpermesataj (natura rezervejo).

Bonvenon al cxiuj !